

Protokolo de la 47-a senatkunsido, okazinta dum SUS 25 en Nitra/Komárno (2002-08-30 ĝis 2002-09-08)

Kunsidhoroj: 2002-09-01, 12:00h–14:10h, 2002-09-04, 20:55h–0:05h, 2002-09-07, 21:00h–2:30h.

Ĉeestantaj senatanoj kaj vicsenatanoj: Angstl, Fössmeier, Frank, Holdgrün, Lewoc, Quednau, ekde lundo ankaŭ Minnaja kaj Pennacchietti.

Okazis kelkaj ŝanĝoj rilate al la skribe fiksita programo: la kurso de kolego Eichhorn ne okazis; anoncis liberajn prelegojn sinjorino Bojaĝieva kaj sinjoro Derks.

Al la ekzamenofico estis alektitaj gekolegoj Frank (1), Pennacchietti (2), Minnaja (3), Frank (4), Quednau (5) kaj Poláková (6).

La temo de la Forumo laŭ la propono de la prezidanto estu „La scienco: ĉu rimedo, ĉu celo?“.

Por la starigo de la partoprenlisto, por la enkasigo de mono por aliĝo kaj ekzamenoj inkluzive kursojn, kaj por la finkalkulo same kiel dum antaŭaj SUSoj zorgu la Senata Sekretario ADoc. Lewoc.

La prezidanto pretas zorgi pri la produktado kaj disdono de ĉiuj dokumentoj de SUS 20 kaj BUS 1, BUS 2, BUS 3 kaze ke ekzistas indikoj, ke la koncernaj ekzamenoj estas sukcese trapasitaj. Rapida transdono de la dokumentoj kaj atestoj por la ekzamenoj de SUS 24 pasintjare en Bydgoszcz eblas, se la kandidatoj tuj pagas al AIS la ankoraŭ mankantajn ekzamenkotizojn; la aliaj devas atendi decidojn pri la transpago fare de Monda Turismo. En la kazo de duobla pago al AIS la kandidatoj kompreneble ricevos la monon, kiun ili tropagis al AIS.

La senato konfirmis, ke dum ĉi tiu SUS ĉiuj kandidatoj devas laŭregulare pagi.

La jenaj alvokoj kaj rangoplialtigoj estas de la senato aprobitaj: Al OProf. estas alvokitaj la gekolegoj La Torre en la 1-an sekcion, Lee kaj Mattos en la 2an, Lobin kaj Poláková en la 6an sekcion. En la kazo de kolegino Poláková la plejmulto de la senato ne kontraŭas, se ŝi preferas esti OProf. en la 1-a sekcio. Por kolego Pauli en Brazilo la senato konfirmas, ke li estas OProf. en la 4a sekcio. Alvokoj al AProf. okazas por la kolegoj Stoffa (1), Corsetti

(2) kaj Milnera (5).

Kolego Fössmeier atentigas, ke la senatanoj atentu la regularon ankaŭ en la kazo de punkto 12.1 de la apendico de la statuto, laŭ kiu ebkas antaŭ aktuala senatkunsido transdoni sian voĉon asub difinitaj kondiĉoj al alia senatano.

La plimulto de la senato ne sentis bezonon refute reagi al la malĝustaj asertoj en la letero sendita de Monda Turismo. Post longdaŭra diskuto la plimulto de la senato tamen decidis okazigi BUSon fine de septembro en Bydgoszcz. La ekzamenoficon reprezentu tie la kvin ĉeestontaj efektivaj membroj de AIS, nome gekolegoj Kowalczyk, Lobin, Mielczarek, Sudoł kaj Quednau, kiuj atentu, ke ĉiuj necesaj dokumentoj de la kandidatoj estu ekzamenpretaj plaj malfrue la tagon antaŭe. En tiu punkto ĉiu el la kvin membroj havu la rajton, malebligi pro nekompleteco la ekzamenigon.

Protokolis: *H. S. Holdgrün, Vicdirektoro de la Publikig- kaj Protokolofico.*